SK-4/6

# TRI RAKONTOJ

# KAJ KELKAJ VERSAĴOJ

ORIGINALE KAJ ESPERANTE VERKITAJ

DE

Rafael de San Millán

★

MADRID (España)
Tip. Pasaje del Comercio, 8
1914.ª

2765

Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (9)1 - 4468079

PEDRO NARANJO TERAN
DEL^TO DE U.E.A.
JEREZ DE LA FRONTERA
(HISPANIO)

82-8
SAN
Tu

Al D.º L. L. Zamenhof
Elpensinto de Esperanto.

*Kara Majstro; bonvolu akcepti tiun ĉi malgrandan pruvon de miaj simpatio, amikeco kaj admiro.*

*Ni vin honoras nun, multaj homoj, sed en la estonto la tuta Homaro eterne glorios vin.*

Rafael de San Millán.

Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio
Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (9)1 - 4458079

2765

# La domo de la koboldo

Ĉe la komenco de la XIXª jarcento, en vilaĝo proksima al malgranda urbo ekzistis ia domo kiu de neniu estis loĝata ĉar oni diris ke fantomoj aŭ koboldoj en ĝi loĝas.

En tiu epoko la popolamaso estis tre malklera kaj kredema; tial multaj personoj ne dubis pri tio, ke supernaturaj estaĵoj promenas tra la mondo.

La vilaĝanoj kun teruro rigardis la cititan domon, kaj nur malproksime kaj rapide antaŭ ĝi preterpasis.

La posedanto neniam povis konvinki iun pri tia eraro, kaj eble li mem ne kuraĝis eniri sola la domon.

Juna kapitano kiu jam montris sian kuraĝon en kelkaj bataloj, venis kun sia servsoldato loĝi en la urbo, kaj aŭdis paroli pri la terura domo.

Li—homo klera—ridis je la kredemeco kaj malkuraĝo de la simplaj vilaĝanoj, kaj baldaŭ preskaŭ forgesis la domon kaj la koboldojn.

La servsoldato eble ne turnis atenton al tiu afero, ĉar li de sia alveno en la urbon, estis tre priokupata pri la bela vizaĝo de juna kudristino kiu rigardis lin per dolĉaj rigardoj, kaj post mallonge respondis favore liajn amantajn parolojn.

La kapitano estis gaja kaj amuziĝema viro, kaj la kvieta vivado de la trankvila urbo estis tre enuiga; pro tio li trinkis kaj poste drinkis; li ludis kaj poste ludadis. Sekve li perdis. Baldaŭ liaj kalkuloj montris al li grandan deficiton en lia budĝeto, kaj trudis al li malpliigi elspecojn.

Kiam li nur malfacile povis pagi sian apartamenton, tiam la domo de la koboldo venis en lian rememoron, kaj ĉar li supozis ke la posedanto estas preta luigi tre malkare tiun neutilan domon, decidis ĝin lui kiel eble plej baldaŭ. La afero facile estis farita tute laŭ lia deziro, sed kiam li diris al sia servsoldato, sian decidon observis, kun miro, ke la soldato malkontentiĝis.

—Nu—ekdiris la kapitano—ĉu eble vi timas la koboldon?

—Mi ne diras eble; mia kapitano, sed certe mi ĝin timas—respondis la soldato.

—Pro la diablo!—ekkriis la kapitano.—Mi ne povas tion kredi. Soldato kiu timis nek kuglojn nek kuglegojn; kiu kuraĝe atakegis

la malamikojn en ne malmultaj bataloj, ĉu tiu timas koboldojn? Ne; mi tion ne kredas.

—Ha! mia kapitano; kredu tion kaj ankaŭ timu la koboldojn. Ili ekzistas, mi estas certa, kaj mi aŭdis al multaj seriozaj kaj kuraĝaj viroj paroli pri tiu kiu loĝas en la malbenita domo. Ja; ĉiunokte sonas en tiu domo grandaj bruoj kvazaŭ oni trenas ĉenojn, kaj tra la fenestroj eliras strangaj lumoj. Ne dubu; tie estas koboldo kiu per teruraj turmentoj mortigos tiun kiu kuraĝos loĝi en ĝia hejmo.

—Iru en la Inferon kun via rakonto—respondis la kapitano—tion nur maljunaj nesciaj virinoj povas kredi. Kio estas al vi? Ĉu vi perdis vian ĉiaman kuraĝon? Morgaŭ ni estos en nia nova hejmo.

La soldato silentis kaj foriris kun malgaja mieno.

La sekvantan tagon jam ambaŭ militistoj loĝis en la terura domo.

Nokte la kapitano metis apud sia lito sian sabron kaj ankaŭ siajn pistolojn de li mem zorge ŝargitaj. Se eble la koboldo estis ia malbonaganta viro; ekzemple, fabrikisto de kontraŭleĝa mono, la kapitano deziris akcepti lin laŭ lia indo.

Post noktomeze vekis la kapitanon strangaj bruoj kvazaŭ oni trenis dikajn ferajn ĉenojn. Li atentis kaj atendis, kaj nenio pli okazis; sed li ne povis dormi.

Frumatene la soldato venis en la alkovon de sia mastro kaj diris.

—Ha, sinjoro; kia terura nokto!

—Kial? Ĉu vi malbone dormis?

—Dormi!... kiu povis dormi? Ha, mia kapitano, la koboldo promenis tra la tuta domo!

—Tio ne estas vero; ĝi ne trapasis mian alkovon.

—Ankaŭ ne mian, sed proksime, tre proksime. Ĉu vi ne timis; sinjoro?

—Kion?

—Ĉu vi ne aŭdis la bruojn? Ja; estis timigaj bruoj kvazaŭ oni trenis grandajn ĉenojn, kaj kvazaŭ minaĉantaj voĉoj.....

—Eble vi songis. Mi nenion aŭdis —diris la kapitano, kiu ne volis pravigi sian servanton.

Trankvile pasis la tago, sed la sekvantan nokton la bruoj estis ankoraŭ pli fortaj.

Tage la soldato denove montris sian teruron kaj la kapitano sian obstinon.

La trian nokton la bruoj fariĝis neelporteblaj, kaj terura voĉo sonis minaĉanta.

La brava militisto estis vigla kaj atendis trankvile. Kiam la dua horo batis, la bruoj alproksimiĝis al la alkovo kaj post kelkaj minutoj la pordo malfermiĝis kaj aperis granda blanka figuro en kies kapo brilis kiel fajro lumaj okuloj. Tuj la koboldo ekparolis kaj per raŭka voĉo diris:

—Vi kiu venis maltrankviligi mian ripozon; vi kiu venis uzi mian domon, vi mortos...

Ĝi ne havis la tempon diri plu, ĉar la kapitano prenis siajn pistolojn kaj de tre proksime pafis al ĝi. Sed la koboldo nek falis nek tremis eĉ unu momenton. Kontraŭe ĝi per laŭta voĉo kriis.

—La kugloj min ne vundas! Prenu ilin— kaj ĵetis sur la liton ambaŭ kuglojn.

La kapitano restis mirigata, sed nur mallonge. Li forsaltis el sia lito, prenis sian sabron kaj forte batis,—sed ne per la tranĉrando —la nevundeblan koboldon. Tiam la lumigaj okuloj mallumiĝis, kaj forta bruo sonis kvazaŭ poto falas kaj rompiĝas.

La koboldo ekkriis:

—Pro la Sankta Virgulino! ¡mia kapitano, ne mortigu min!

—Ha kanajlo!; ĉu vi estas la fantomo?

—Pardonu min; pardonu min—ripetadis la servsoldato.

—Nu, klarigu al mi tion. Kial vi ludis tian ridindan komedion?

—Jes sinjoro; mi klarigos... Ja... sinjoro; tiu ĉi urbeto ne estas sufiĉe proksima al la urbo.....

—Tio al mi ne malhelpas—diris la kapitano.

—Al mi multe malhelpas.....

—Sed tio ne klarigas al mi la aferon.

—Sinjoro; en la urbo loĝas kudristino...

—Ankoraŭ mi ne komprenas. Diru. Kia rilato estas...?

—La kudistrino estas bela..... ne; mi ne diris veron; ŝi ne estas bela, sed belega.....

—Ha, jam mi komprenas. Jam mi scias kian rilaton estas inter la interspaco, la kudristino, la koboldo kaj vi malsaĝulo, vi fripono kiun mi.....

—Pro Dio! mia kapitano; ne rekomencu! —ekkriis la soldato, ĉar denove levis sin la armita mano de lia mastro.

—Vi certe meritas ke mi rekomencu, fripono! Nun mi bone komprenas ĉion. Hodiaŭ vi eltiris el miaj pistoloj la kuglojn, kaj mi pafis nur per pulvo... Mi ne rekomencos, sed promesu al mi ke vi estos saĝa.

—Jes; mi tion promesas.

—Kaj mi—rediris la kapitano—mi ankaŭ promesas al mi mem nek drinki nek ludi. Kiam finiĝos tiu ĉi monato, ni denove loĝos en la urbo. Sed gardu vin, ĉar ofte bela knabino estas pli timinda kaj danĝera ol la malamikaj kanonoj; kaj ni ambaŭ devas scii ke la realaj, la danĝeraj koboldoj por la viroj estas la vino, la ludo kaj precipe la belaj knabinoj.

# La bandito sangdrinkulo.

## I

Estas nokto malluma, malvarma. Estas vintra nokto. La vento blovas forte. La ago okazas la lastajn jarojn de la unua duono de la 19ª jarcento.

En monto, en loko preskaŭ dezerta kaj sovaĝa staras malbonaspekta dometo. Se oni eniras ĝin oni povas vidi grandan kuirejon kiu ankaŭ estas uzata kiel manĝoĉambro, salonego kaj kudroĉambro. En granda kameno fajro per siaj nekvietaj palflavaj kaj brilaj flamoj, lumigas, varmigas kaj ĝojigas la kuirejon. La domo enhavas ankaŭ du ĉambretojn el kiuj unu estas la dormoĉambro de la geedzoj, posedantoj de la konstruaĵeto, kaj la alia tiu de la kvin geinfanoj. Nun tiuj ĉi dorm-

as, dum iliaj gepatroj apud la kameno sidas sur neluksaj sed oportunaj apogseĝoj.

—Kia malbona vetero!—diris la edzino—kia malvarmeco! Mi timas povas okazi al vi malfeliĉon.

—Ne timu—respondis la edzo—multajn noktojn pli malagrablaj mi pasigis en kamparo kaj mi trapasis la montaron. Tamen al mi nenia malfeliĉo okazis.

—Sed ofte vi riskis vian vivon.

—Certe, ne malofte mi aŭdis aerbruetojn de kugloj proksime al mia kapo, kaj kiam oni aŭdas tian brueton ĉiam ŝajnas ke la kuglo frotas nian haŭton. Sed ne timu; tiu ĉi nokto estos la lasta.

—Tial mi timas pli ol ĉiam, ĉar mi havas antaŭsenton kiu diras al mi, ke vi riskos hodiaŭ vian vivon pli ol unu fojo, kaj vi suferos malfeliĉon.

—Ne estu kredema; certe al mi nenio okazos. Vi vidos.

—Mi multe deziris ĉiam ke vi forlasu tian malbenitan metion.

—Metio! ĉu mia negoco estas metio?

—Tio estas same. Sed se vi volus atenti miajn petegojn vi ne forirus hodiaŭ.

—Ho! la negoco estas bonega. Aliparte mi jam ne povas ĝin forlasi, ĉar mi metis en la aferon mian tutan kapitalon. Tiu ĉi nokto

estos la lasta; morgaŭ ni havos la necesan monon por lui la belan vendejon kiu estas luigota en la urbeto, kaj vi bone scias ke tiu negoco nepre riĉigos nin, kaj kiam niaj infanoj estos plenaĝaj, ili estos riĉaj kaj feliĉaj. Nun nia kapitalo estas granda; baldaŭ ĝi estos grandega. Vere la vetero estas malbona, sed por mi ĝi estas tre bona ĉar certe la doganistoj dormos la tutan nokton apud la fajro sen rememori pri kontrabandistoj.

—Dio volu tion! mia kara edzo.

—Jes, certe morgaŭ ni estos riĉaj kaj baldaŭ multe pli riĉaj.

—Pro la Sankta Virgulino ne parolu tiel laŭte ĉar se iu scius pri nia riĉeco.....

—Kiu povas aŭdi nun tion?

—Se Sangdrinkulo scius ke ni estas riĉaj, li venus rabi kaj mortigi nin. Ja vi aŭdis ke antaŭ du tagoj oni vidis tiun timigan banditon kiu estis kun siaj subuloj en loko ne malproksima. Ha! mi multe timas resti sola kun niaj filetoj la tutan nokton.

—Sed kiu intencos rabi tian malbonaspektan domon? Kiu scias pri nia kapitalo?

—Silentu pro Dio! ĉu vi ne aŭdis...?

Estis paŭzo, kaj ambaŭ geedzoj atente aŭskultis sen spiri.

—Ne timu, belulino mia; ne timu, mi re-

diras al vi; tio estas la vento kiu blovas pli kaj pli, sed ĝi tute ne estas.....

—Ne elparolu la alnomon, mi petegas. Mi timas li povas aperi kiam oni nomas lin.

—Malsaĝaĵoj! sed mi devas foriri; la horo estas: Mi devas ne malfrui.

La edzo prenis sian mantelon kaj sian pafilon, ŝirmis zorge sian kapon per dika ĉapo kaj malfermis la pordon tra kiu brue eniris blovanta vento. La flamoj de la kameno estis forte skuataj kaj la kuirejo malvarmigata.

La kontrabandisto post kisi sian edzimon, foriris rapide kaj fermis la pordon. La edzino ŝlosis kaj riglis ĝin. Ŝi sentis tremfrostojn de teruro, kaj malgraŭ ke la fajro rapide varmigis denove la ĉambron, ŝi envolvis sin per dika kovrilo kaj falante ĝenue antaŭ malarta pentraĵo kiu prezentis sanktulon, fervore preĝis longe.

Ekstere la vento muĝis pli kaj pli forte.

La timigata virino ne kuraĝis formeti sian veston. Ŝi alportis en la dormoĉambron de siaj filoj, seĝegon kaj tie bone ŝirmita per kovriloj kaj apogante la kapon sur kusenon ŝi intencis dormeti. Tra la pordeto eniris la varmo kaj la lumo de la fajro. Interne en la domo ĉio estis plene trankvila; nur la bruo de la flamoj kaj tiu de la regula spirado de la infanoj sonis.

La kontrabandistedzino iom post iom trankviliĝis, kaj la oportuno de la seĝego kaj la konforto de la kameno kaj kovriloj sentigis al ŝi dolĉecon per kiu de tempo al tempo ŝi forgesis la eksteraĵon kaj ŝia konscio nebuliĝis.

Fine la laco venkis kaj ŝi dormis profunde.

## II

Jam alproksimiĝis la tagiĝo kiam oni forte frapis la pordon. La kontrabandistedzino vekiĝis ektimigata kaj ne kuraĝis fari eĉ movon. La frapoj sonis denove pli kaj pli forte.

—Malfermu, malfermu tuj— kriis raŭka voĉo.

—Ha; Sangdrinkulo!—ekĝemis la timigata virino.

—Ĉu vi ne konas min? Malfermu, pro la ĉiuj diabloj de la infero!

Ŝajnis al la virino la voĉo estas tiu de ŝia edzo, sed ankoraŭ ŝi dubis. Iom post iom ŝi alproksimiĝis al la pordo.

—Malfermu! kion vi atendas?—diris ekstere la raŭka voĉo.

—Ha! jes, li estas mia edzo—pensis la virino kaj malriglis, malŝlosis kaj ankoraŭ timante malfermis la pordon.

Kvazaŭ lavango saltis en la ĉambron viro kiu ŝajnis frenezulo. Li estis la kontrabandisto. La edzino fermis denove la pordon kaj mirigata pro la aspekto de sia edzo demandis al li.

—Kio estas al vi? mia kara.

—Kio plej eble malbone povas esti? La okazo plej eble terura! Ni estas malriĉaj; jam Sangdrinkulo povas veni se li volas. Li nenion trovos tie ĉi. Ni estas nur mizeruloj, kaj eble postmorgaŭ niaj filetoj petos al ni panon, kaj ni havos nenion por doni al ili.

—Ha! mia edzo, trankviliĝu, mi petas. Trinku freŝan akvon—diris la edzino, kaj alportis glason da malvarma akvo.

Li trinkis iom kaj ĵetis sin sur apogseĝon.

—Kio estis? Kia okazis?—demandis la virino karesante sian edzon.

—Ha! ni estas malfeliĉaj; ni ĉion perdis!

—Diru; parolu!

—Se vi volas scii tion, kio pli bone estus ke vi scius ĝin neniam, aŭskultu min atente.

—Jam mi atentas. Diru.

La kontrabandisto sopiris kaj komencis:

—Kiam mi foriris, mi iris tra la kruta vojeto serĉi miajn kunulojn. Ili estis jam ĉiuj kuniĝintaj kaj ĉio estis preta. Ni marŝis tra ŝtona deklivo, kaj post longa marŝado ni trapasis la landlimon; ni fajfis laŭ nia maniero;

ni aŭdis la respondon kaj fine ni trovis niajn amikojn kiuj atendis nin kun la ĉevaloj tre ŝarĝitaj. Tiam komencis la danĝera ekskurso. Ni revenis tra malbonegaj deklivoj dum la vetero plimalboniĝis kaj ventego vipis niajn vizaĝojn per pika neĝo. Tio ne malplaĉis al ni, kontraŭe ĉar ju pli malbona estas la vetero des pli malfacile estas trovi malamikojn. Fine ni atingis la landlimon; ni trapasis ĝin kaj tiam mia koro batis fortege ĉar mi pensis pri niaj infanoj kies estonton mi kredis felica. Kia eraro, mia Dio! Kiam oni estas certa pri sia sukceso...?

—Ĉu la malbenita Sangdrinkulo atakis vin? —demandis plorante la edzino.

—Sangdrinkulo! pli bone estus tio. Ne Sangdrinkulo; la doganistoj estis. Kiu sciigis ilin pri nia afero? Mi ne povas diveni. Sed certe iu tiel malbone agis ĉar se ne la doganistoj ne trakurus la montaron en tia timiga nokto. Ili estis embuskitaj, kaj profitante nian senzorgon, ili de tre proksime pafis al ni. Du almenaŭ el miaj amikoj falis, kaj mi supozas ili estas mortigitaj. En ĉiuj lokoj brilis la fajro de la pafado, kaj baldaŭ ni estis ĉirkaŭataj de la doganistoj kiuj arestis ĉiujn, ŝajnas al mi. Mi kuris freneze, dum kelkaj doganistoj pafis aparte al mi; sed feliĉe la mallumo, min defendis, kaj mi kuris, kuris falante ofte, ek-

tuŝegante kontraŭ arboj kaj ŝtonegoj. Fine mi alvenis tien ĉi, sed kiel mi alvenis! al mi nur restas mia mantelo kaj mia pafilo.

La edzino ploris, kaj la kontrabandisto per fiksitaj okuloj rigardis senmove la flamojn. Lia vizaĝo estis timiga. Pri kio li pensis?

Post ne longa tempo li eksaltis el la apogseĝo kaj reprenis la mantelon kaj la pafilon.

—Kion vi intencas fari?—demandis kun teruro la virino.

—Mi ne scias, sed niaj filoj bezonas ke mi ion faru!—li respondis.

—Pro Dio; mia kara; ne faru malsaĝajon; ne estu malbonaganta!

—Lasu min —li ekkriis —pro la diablo! mi ne scias kion mi faros—kaj puŝante ŝin li malfermis la pordon kaj foriris kurante kvazaŭ frenezulo tra la kamparo.

## III

La kontrabandistedzino restis momenton senmova. Poste ŝi timis ŝia edzo eble malbone agos puŝata de malespero, kaj ŝi ankaŭ foriris kaj kuris vokante lin. Ne estis eble lin vidi, ĉar ankoraŭ estis mallume; li ne respondis kaj jam ŝi ne aŭdis la bruon de liaj paŝoj. Fine ŝi altis kaj rememoris ke la pordo

de la dometo restis malfermita. Kion fari? Ŝi volus haltigi sian edzon, kaj samtempe ŝi deziris reveni baldaŭ sian hejmon. Sed jam konvinkita ke ŝi ne povos atingi la kontrabandiston, ŝi sufokiĝanta, laca, ploranta intencis reveni en la dometon. Ŝi estis sur nenia vojo, inter ŝtonegoj, kaj la mallumo multe malhelpis ŝin. Tamen la patrina instinkto montris al ŝi la direkton, kaj ŝi marŝis kiel eble plej rapide, ektuŝegante tien kaj tien ĉi. Ne atendite ŝi sentis ke oni prenas ŝin per la jupo kaj ŝin haltigas perforte.

Ŝi ektremis kaj ekĝemis. La terura figuro de Sangdrinkulo venis en ŝian rememoron, kaj ŝi per tremanta voĉo petegis:

—Sinjoro Sangdrinkulo; respektinda bandito! Pro la savo de via animo; ne mortigu min. Mi estas malriĉa, mi nenion havas, kaj mi juras diri neniam ke mi trovis vin tie ĉi.

Neniu respondis, sed ŝi ne povis fari eĉ paŝon.

Ŝi denove petegante falis genue kaj tiam la jupo estis ŝirata kaj ŝi restis libera. Nur nuda dorna branĉeto haltigis ŝin per la vesto. Ŝi spiris forte; malvarma ŝvito malsekigis ŝian frunton, kaj kiam ŝi levis sin io frapis ŝian kapon. Tio estis alia branĉo. Fine iom post iom, tremanta, laca ŝi eniris sian hejmon. Ĉio estis orde; neniu eniris. La infanoj dormis

trankvile. Nek la frapoj en la pordon, nek la ekploroj de ilia patrino nek la interjekcioj de ilia patro estis vekantaj ilin. Ilia dormado estis peza, profunda. La dormado de la infaneco.

Ĉe la orienta horizonto en la ĉielo, blanka franĝo anoncis la alvenon de la tagiĝo.

## IV

Longan tempon la malfeliĉulino sidis sur la planko antaŭ la fajro apogante la kapon sur seĝego kaj skuata de ekĝemoj. Ŝi ne havis forton levi sin por sidi pli oportune.

Ĉu unu horo? ĉu du horoj pasis? Ŝi ne sciis pri la tempo.

Bruo de rapidaj paŝoj revivigis ŝin kaj ŝi iris al la pordo kaj rigardis. Jam estis tage. Griznuba ĉielo preskaŭ ne permesis al la suno lumigi la Teron; la kamparo estis malseka; la vento ĉesis. Ŝajnis ke Naturo post maldormi la tutan nokton ekdormis matene. La kontrabandisto revenis al sia hejmo kurante kaj per siaj movoj montradis grandan eksciton.

Kiam li eniris forĵetis la pafilon kaj mantelon kaj eksidis, sed tuj denove levis sin kaj promenis tra la ĉambro sufokiĝanta de emocio kaj pro la kurado.

Lia edzino ne kuraĝis demandi ion. Poste ŝi diris kun timo:

—Ĉu nova malfeliĉo eble pli terura...?

La kontrabandisto ne povis ankoraŭ paroli, sed li rapide faris neajn signojn. Kiam li troviĝis iom kalmita li ekkriis:

—Ni jam estas feliĉaj; pli feliĉaj kaj pli riĉaj ol antaŭe.

—Kion vi diras? mia edzo. Ĉu vi ne deliras?

—Ha, ne; certe ne, kaj mi baldaŭ konvinkos vin pri tio.

—Sed, pro la Sankta Dio! kion vi faris? Ĉu vi agis malbone?

—Jes; ne... mi ne scias. Vi juĝos kiam mi rakontos tion al vi. Ha! mi pensis pri miaj filetoj. Nur por ili mi faris tion kion mi faris.

—Ve! mia kara edzo, vi timigas min. Rakontu, rakontu baldaŭ, se tio ne estas tiel grava ke mi ne devas ĝin scii.

—Mi parolos. Certe tio estas interesa. Aŭskultu. Malbonaj, tre malbonaj intencoj venis en mian kapon, kaj kiam mi kuris tra la monto mi sentis min kapabla fari ĉiujn malbonajn agojn. Post longe marŝi mi serĉis kaŝejon inter ŝtonegoj kaj kreskaĵoj apud mallarĝa vojeto; mi ĝin trovis kaj mi tie atendis. La ĉielo sendis jam iom da lumo. Mi ne scias ĉu pasis longa tempo ĉu ne, mi nur rememoras ke mi vidis ĉion kvazaŭ sangkolorigita.

—Ha edzo mia, kia teruro!

—Aŭskultu, aŭskultu min kaj silentu. Mi aŭdis paŝojn de ĉevalo kiu venis; mi ekrigardis kaj efektive, trankvila, senzorga rajdanto estis jam proksima. Kiam li alvenis, mi rapide forsaltis el mia kaŝejo, kaj celdirektante al li la pafilon, mi kriis— Haltu—La rajdanto instinkte direktis sian dekstran manon al leda ingo kie li ankaŭ pafilon portis. Sed mi diris al li:

—Se vi intencas preni la pafilon mi tuj mortigos vin.

Li restis senmova kaj mi aldonis:

—Faligu en teron la ingon kun la pafilo. Tiam li malagrafis rimenon kaj ingo kaj pafilo falis.

—Forĵetu monon el via poŝo—mi ordonis.

Li kelkajn fojojn metis la manon en poŝon kaj forĵetadis iom post iom orajn monerojn. Dume mi kalkulis la monon kaj kiam mi vidis ke la kvanto estas tiel granda kiel tiu kiun de mi prenis la doganistoj, mi diris:

—Ĉesu!

—Pro la diablo!—ekkriis la rajdanto—ĉu vi plu ne volas?

—Mi plu ne bezonas.

—Malgraŭ tio—li rediris—prenu ankoraŭ. Mi volas doni pli al vi—kaj li ĵetis multajn orajn monerojn. Poste salutante per la mano li aldonis:

—Adiaŭ; amiko. Estu feliĉa; kaj de nun vi povas fiere diri ke en la tuta mondo vi estas la sola viro kiu rabis lian monon al la fama bandito Sangdrinkulo.

Li per malrapida galopo foriris, kaj mi restis longe kvazaŭ ŝtoniĝinta. Mi sekvis lin per mia rigardo; mi vidis ke li jam malproksime supreniris monteton, alvenis en la suprajôn kaj malaperis tra la kontraŭa deklivo.

Ankoraŭ mi restis longan tempon senmova; poste mi kalkulis la monon. Ĝi estas kapitalo multe pli granda ol tiu kiun ni posedis hieraŭ; eble pli ol trioblo. Imagu al vi mian emocion. Mi gardis la trezoron kaj rapide marŝis por reveni. Mia gajeco estis tiel grandega ke mi faris malsaĝaĵojn; mi saltis; mi kantis, mi kriis kaj dezirante pafi por festi per pafsaluto mian bonan ŝancon, mi faligis la ĉanon de mia pafilo... sed pafo ne foriris. Mi tiam rememoris ke kiam la doganistoj atakis min kaj miajn amikojn, mi senkonscie pafis. Sed kial mia kaprico pafsaluti mian bonan ŝancon estis granda, mi serĉis la ledan saketon kiun mi kunportis pendanta el mia zono kaj kie mi tenis pulvon kaj kuglojn. Mi ne havis mian saketon; nur du rompitaj rimenoj pendis el mia zono. Certe mi perdis la saketon kiam mi forkuris el la doganistoj, ĉar tiam mi ofte falis kaj ne malofte ektuŝegis kontraŭ arboj kaj ŝtonegoj.

Prezentu al vi mian miron kiam mi vidis ke mi estas rabinta al la plej kuraĝa kaj terura bandito, (kiu estis armita per bona pafilo,) minacante lin per pafilo ne ŝargita kaj mi posedante nek pulvon nek kuglojn.

Tio estas nekredebla! ĉu ne vere?

—Vere nekredebla!

—Fine mi estas tie ĉi. Hodiaŭ mem mi iros lui la vendejon kaj baldaŭ ni en ĝi loĝos. Tiun ĉi dometon ni vendos.

—Ha mia edzo!—ekkriis la virino—ni jam estas feliĉaj; sed kian nokton! kian teruran nokton mi pasigis!

—Ankaŭ por mi ĝi ne estis tre bona; kredu al mi—diris la jam ekskontrabandisto, kaj poste li aldonis:

—En la urbeto oni vendas portretojn de Sangdrinkulo. Tiuj ne estas tre similaj al la bandito, mi supozas; tamen mi aĉetos unu kaj ni pendigos ĝin en nia vendejo. Tia maniere ĉiu tage, ofte ni povos rigardi plezure kaj danke la portreton de la fama, kruela kaj teterura bandito Sangdrinkulo.

## Ĉu en la mondo estas io neutila?

Vesperiĝis kiam granda bela vaporŝipo albordiĝis la havenmarŝejon en suda gaja urbo. Tuj post kiam finiĝis la ankrumaj laboroj, elŝipiĝis kelkaj maristoj kiuj brue interparolis kaj gaje ridis. Ili eniris la urbon kaj alvenis en drinkejon kie ili estis kore akceptataj ĉar jam de longe tie oni konis ilin.

Multenombra personaro vere nek distinginda nek silenta, lumo ne tre klara, malpura aero kaj sufoka tabaka fumo estis, same kiel magneto al fero, agrablaj altiroj por la maristoj. Ili pliigis la bruon kaj la fumon, kaj ricevis afablajn salutojn, fortajn manpremojn kaj amikajn pugnobatojn en ŝultrojn kaj dorson.

Kelkaj amikoj petis al ili sciigojn pri la lasta vojaĝo; la maristoj raportis kaj estis pli kaj pli bruo kaj ŝercoj. Iu alportis gitaron kaj unu el la jus alvenintaj maristoj ekludis muzikon. Sed kelkaj el liaj kamaradoj kiuj ne atentis pri lia muzika lerteco malhelpis per ridoj aŭdi.

—Silentu!—li kriis—silentu! vi kiuj nenion scias fari ekscepte malhepi.

—Lerta muzikisto; grava saĝulo vi estas—iu respondis ŝerce.

—Nu; kion vi scias fari?—rediris la muzikludinto.

—Montru vian lertecon, kaj poste mi montros mian—la alia respondis—kaj aldonis vi vidos ke mi estas pli saĝa ol vi.

La muzikema tre bone ludis kaj estis varme aplaŭdata de la tuta ĉeestantaro.

Poste kaj dum li denove ludis, alia per bela voĉo kantis agrablajn kantojn, kaj granda ovacio premiis lin.

Tiam kiu ludis, sin turnis al tiu kiu antaŭe promesis montri lertecon, kaj diris:

—Montru vian lertecon; pruvu ke vi estas pli saĝa ol mi. Ni vidu se tio estas vero.

—Certe jes—respondis la alia—atentu ĉiuj kaj vi multe povos lerni, ĉar mi estas talenta kaj klera spertulo.

Ĉiuj atentis, kaj li rakontis kelkajn rakont-

oju tute ne honestaju, kaj plenaju je malĉastaj aventuroj, sed tiel spritaju ke la tuta aŭdantaro ridegis ĝis senti doloron en la flankoj.

—Jam vi vidis—li diris—ke mi estas la plej saĝa kaj ke mi ne nur scias malhelpi—kaj poste rigardante alian kamaradon kiu ne multe ridis, aldonis—ĉu al vi ne plaĉis miaj rakontoj? Eble vi scias fari ion pli agrablan aŭ pli utilan.

—Eble—respondis la kamarado.

—Faru tion kion vi scias—diris kelkaj.

Li levis la ŝultrojn kaj ridetis.

—Faru ion! faru ion!—ripetis multaj.

—Ĉar vi tion volas—li diris malice—mi faros tion kion mi plej bone scias fari.

—Ni ĉiuj atentas.

—Aŭskultu.

Kaj li komencis bleki kvazaŭ azeno tiel forte ke eĉ surdigis kaj tiel bone ke kelkaj azenoj kiuj estis en la apuda strato fervore respondis lin.

Ridego eksplodis en la drinkejo kaj mokaj aplaŭdoj. Li kvazaŭ serioze diris kiam la ridoj ĉesis:

—Mi estis kiu plej ridigis vin; do mi estas la plej sprita.

Multe ĉiuj ŝercis pri tio ĝis kiam la vino, la brando kaj la biero dormigis la plej multon el la ĉeestantoj.

II

Du tagoj poste la citita vaporŝipo eliris el la haveno tre ŝarĝita kaj kun multaj vojaĝantoj. Ĝi veturis tra maro trankvila kaj ne malproksime al la marbordo. La vojaĝo estis feliĉa dum la tago sed kiam noktiĝis, densa nebulo malfaciligis la marveturadon ĉar oni vidis nenion ekster la ŝipo.

El ĉiuj maraj danĝeroj la plej grava estas la nebulo ĉar ne estas vere taŭga rimedo por eviti ektuŝegi ĉu alian ŝipon ĉu ŝtonegon aŭ marbordon. Ĝenerale la ŝipestroj multe malrapidigas la ŝipon en tiaj okazoj, sed estas iuj malkuraĝaj kaj egoistaj kiuj anstataŭ malrapidigi la ŝipon rapidigas ĝin kiel eble plej. Tiamaniere la ŝipo baldaŭ trapasas antaŭ la pruo de alia, sed alia antaŭtrapasanta ŝipo estas pli facile frapota en sian flankon. La profito estas, do, por tiuj kiuj malbonkore kaj malkuraĝe rapidigas la ŝipon.

La ŝipestro de tiu ĉi rakonto estis bona maristo kaj bona viro; tial li multe malpliigis la rapidon kaj preskaŭ senĉese sonigis la fajfilon.

De tempo al tempo oni aŭdis aliajn fajfadojn, sed estis neeble sciiĝi el kie alvenis tiuj sonoj kaj ankaŭ ne se el proksima aŭ malproksima loko. La danĝero estis vere grava.

Subite eksonis fortega azenbleko kiu poste sonadis preskaŭ senĉese pli kaj pli forte.

La ŝipestro mirigata ekrigardis; vidis ke maristo faras tiun sonon, kaj li pensis:

—Kion faras tiu malsaĝulo?—Li iris rekte al la blekanto por lin demandi pri tia strangaĵo, sed antaŭ alveni, li pripensis kaj ekdiris:

—Ha! li ne estas malsaĝulo—poste li laŭte aldonis—Bravo! bravo! ne laciĝu; Dio premios vin.

Preskaŭ en la sama momento kaj proksime al bordo de la ŝipo oni ekvidetis pruon de alia granda vaporŝipo kiu rapidege sin turnis kaj forkuris.

La ŝipestro ne povis elteni sin kaj kore brakpremis la mariston, dankis lin, kaj lin kuraĝigis por ke li ne laciĝu. Preskaŭ la tutan nokton la azenbleko resonadis ĝis kiam dum tagiĝo la nebulo malaperis.

## III

Post ne longe la samaj maristoj troviĝis en la drinkeĵo kiu estas citita ĉe la komenco de ĉi tiu rakonto. Ankaŭ estis tie maristoj de alia ŝipo kiuj parolis pri danĝeroj pro nebuloj, kaj diris ke antaŭ ne longe, (la lastan nebulan nokton) ilia ŝipo apenaŭ ne ektuŝegis marbordon.

—Imagu al vi kiel proksime ni estis al la marbordo—diris iu—ke ni ekaŭdis azenblekojn kaj ni havis nur la tempon rapidege turnigi nian ŝipon kaj forkuri tian danĝeran lokon.

La maristo kiu tiel bone sciis azenbleki fiere rigardis siajn kamaradojn, kiuj varme gratulis lin kaj lin konsideris kiel savinto. Efektive li evitis la ektuŝegon.

Kiel rememorigilo de tia rimarkinda okazintaĵo la drinkejmastro metis en la elpendaĵon sur la pordo figureton kiu prezentis blekantan azenon, kaj la drinkejo estis poste nomata «Drinkejo de la Azenbleko».

De tiam se antaŭ la ŝipestro de tiu ŝipanaro iu malestimas kian ajn kvalinton aŭ econ, ĉiam la ŝipestro filozofie demandas:

—Ĉu en la mondo estas io neutila?

# Al Kolumbo!

Vi trafis per kuraĝ'kaj per talento
la celon de plej granda l'aventuro,
vi venkis povajn fortojn de l'Naturo
ĉar vin respektis fulmo, mar kaj vento.
Vi la perfidon de l'envia sento
venkis, ĉar nek ofendo nek censuro
nek eĉ la kalumnio nek murmuro
rabis gloron al via monumento.
De multaj novaj civilizacioj
via grandega far'estis la fondo,
origino de rasoj kaj nacioj;
vi estis reĝo de la mara ondo.
Eterne gloru la generacioj
Vin; eltrovinto de la Nova Mondo!

*Saluto sendita al la famkonata esperantisto S.° Inglada, dum la festeno per kiu la Madrida Esperanta Grupo, festis la 25an datrevenon de la naskiĝo de Esperanto.*

Dum ni trinkas kelkajn gutojn
en la gajeco kampara
al l'amiko nia kara
ni sendas korajn salutojn.

—

Ni festas la datrevenon
de l'naskiĝo de la nia
kara lingv'internacia,
Ĝi ricevu Dian Benon!

—

Ni bedaŭras vi ne estas
tian tagon tie ĉi,
sed, kredu, ĉiam ĉe ni
via rememoro restas.

—

Kaj kial la saman emon
havas ĉiu kiel mi
ĉiu, do, sendas al vi
sian plej koran brakpremon.

---

*En la 25a datreveno de la naskiĝo de Esperanto.*

*La Stelo de l'Espero.*

Ho, societ' en vi, de via fondo
estas ĉie brueg'krio kaj bato

sed estas nek indulgo nek kompato,
eterna batalkamp'estas la mondo.
La paf'estas al pafo la respondo,
oni ricevas morton de la frato,
ruĝigita de sang'estas la strato
kaj la kamparo kaj la mara ondo.
Tamen jam estas klara, verda lumo
kiu la nigran mallumecon ŝiras
kaj feliĉon promesas al la Tero,
jam malpliiĝas batalbru'kaj fumo,
Homar'alten rigardas kaj sopiras
ĉar aperas la Stelo de l'Espero!

---

*Neĝo kaj fajro.*

L'amdi'estas junulo, mi jam tio ne estas,
tamen en mia koro por ĝi loko ja restas;
sed sub l'unuaj neĝoj kaŝiĝas mia flamo,
mi devas silentigi la voĉon de la amo!

---

*Al Fraŭlino C. S.*

Ho Fraŭlino simpatia!
samideano mia
via dolĉa rememoro
vivados en mia koro.

---

*Al Fraŭlino D. S.*

Kiam mi vidas vian vizaĝon
mi rememoras tuj mian aĝon

ĉar estas via beleco suna
kaj mi ne volus esti maljuna.

---

*Bela brunulino!*

Via belec'estas dia,
vi hispana brunulino
estas ja rava diino,
bela sun'andaluzia.
Tiu ĉi kanteto mia
inda je vi ja ne estas
sed en mia kor'ne restas
ĉar tiu ĉi verk'malbona,
nek agrabla nek belsona,
mian admiron atestas.

---

*Jam estas aminda la vivo!*

Mi jam sen espero
estis en la Tero
kaj jam mia voĉo silentis;
mi pri kio vidis
malestime ridis,
malgaja la koron mi sentis.

—

Tra tero kaj maro
tra l'tuta Homaro
mi trovis nek bonon nek belon;
mi malŝatis ĉion,

mi amis nur Dion,
de l'vivo mi perdis la celon.

—

Sed nun mi vin trovas
mi jam ami povas,
por kanti jam estas motivo
Ho vizaĝo bela!
Ho spirit'anĝela!
jam estas aminda la vivo!

---

## *Ĝi estas revo!*

Ĝi estas rev'sendube, sed mi vidas
palacon kiu sidas
meze ĝardeno bela
kaj lumigata de la suno hela;
ĝi estas konstruaĵo arabstila
en pejzaĝo pentrinda kaj trankvila.

—

Malproksime al bruo de l'Homaro
en maroka montaro,
sub sennuba lazuro,
kvazaŭ juvel'gardata de l'Naturo,
kvazaŭ ia artaĵo delikata
ĝi staras, paradizo nekonata.

—

Ornamitajn arkaĵojn kaj kolonojn,
artajn luksajn salonojn
kaj kortojn kaj fontanojn

kaj parfumigajn refreŝigajn banojn;
amuzojn kaj konforton kiuj ravas
tiu mirinda konstruaĵ'enhavas.

—

Kaj de ĉi tiu tuto de beleco
en trankvila soleco,
de ĉi tiu artaĵo,
de tiu ĉi mirinda konstruaĵo
mi estas posedanto la feliĉa
kvazaŭ pova kalifo la plej riĉa

—

Estas bela vespero, jam la suno
estas cedonta al luno
l'estradon de l'ĉielo,
baldaŭ vidiĝos la unua stelo;
Naturo paca kaj ĉielo brila!
ebriiga veter', veter'aprila!

—

Mi kun araba vesto kaj turbano,
kun pafilo en mano
kaj per majesta pozo,
kun konfida nezorgo kaj ripozo
sur la fortika korpo de l'ĉevalo
fiere supreniras el la valo.

—

Mi alvenas, eniras la edenon,
trapasas la ĝardenon;
la servistoj alvenas,
la piendigon kaj la bridon tenas;

mi tuj saltas en teron kaj sopiras
kaj la palacon kun plezur'eniras.

—

Min salutas humila servantaro,
mi tra luksa ŝtuparo
alvenas la haremon
kaj en kor'sentas emocian tremon
ĉar vokas min per sia voĉ'amata
la unua edzin', la favorata.

—

Kvazaŭ brilega sago de l'Amdio
la lasta sunradio
eniras la salonon
kie mi aŭdis l'amegatan sonon;
en miajn brakojn ĵetas sin virino
kiu vi estas, mia ĉefedzino.

—

Sed, ve! ĝi estas rev', nur iluzio,
malvera fantazio.....
tamen, jen estas vera
tiu ĉi lasta frazo tre sincera:
dolĉa, rava virin'mia trezoro
vi estas sultanin'de mia koro!

---

*Ĉielo kaj Tero.*

En land'bela mi konis anĝelon,
ŝi prezentas al mi la ĉielon
kaj l'inferon, ĉar estas la amo

de l'kor'mia bruliganta flamo.
Ha! ŝi estas anĝelo ĉiela
sed samtempe virino tre bela.
Mia am'estas vere miksaĵo
ĉar en mi, tiu bela estaĵo
ĉiam vekas la emon al bono
sed samtempe min faras demono.
Dolĉa sento, kaj pura la mia
sento estas vere poezia
kial estas ŝia korp'amata
la plej pura, dolĉa, delikata.
Sed samtempe mi sentas kolere
boli brue la sentoj infere,
el la brusto forkuras sopiro
de pasia kaj ardanta viro.
Mi ŝin metus sur sanktan altaron
kaj mi kantus humilan preĝaron
kaj per tre bonodora parfumo
kaj per klara miriganta lumo
ŝin adorus de l'viv'ĝis la fino
kvazaŭ sola sanktega diino.
Sed samtempe la koro batanta
igas min frenezul'deliranta
kaj mi tuj forgesante preĝadojn
aŭdigante grandegajn bruadojn
kaj montrante teruran suferon
la altaron faligus sur teron.
Forlasante baldaŭ la ruinon
mi forportus la belan virinon;

la vizaĝon mi ŝmacus amege
kaj la korpon brakpremus tre ege
ĝis sangtrempi pro premo la lipojn,
ĝis krakigi perforte la ripojn,
ĉar la amo min puŝas sen timo
al delir', al frenez'kaj al krimo.
Ho, plej bela virin'el la Tero!
mia sola dezir'kaj espero.
Ho, anĝelo plej sankta kaj dia!
ĉiam estos diin'pura mia.
Virin'bela kaj dolĉa anĝelo!
estas ŝi mia Ter'kaj Ĉielo!

## PRESERAROJ.

| Paĝo | Linio | Anstataŭ | Oni legu. |
|---|---|---|---|
| 6.ª | 14.ª | minaĉantaj | minacaj. |
| 4.ª | 22.ª | minaĉanta | minaca. |
| 11.ª | 28.ª | sen spiri | senspire. |
| 12.ª | 17.ª | ĝenue | genue. |

# "HOMARO"

## Madrida Ĉiumonata Revuo

Jara abonprezo: Sm. 1—por ĉiuj landoj

*Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista.*

*La Eldonejo akceptas respondkuponojn.*

«HOMARO» eldonos interesigajn broŝurojn, kiujn oni sendos senpage al la abonantoj.

*Nur oni sendos specimenon sendante al la Eldonejo respondkuponon.*

ADRESO:

*J. M. Rosenörn. - Pasaje del Comercio, 8.*

*Madrid - España-(Hispanujo.)*